

MACAULAY

HORACIO

EL LA BALADOJ PRI ANTIKVA ROMO

DUA ALDONO



TRADUKIS

C. BICKNELL

BORDIGHERA


STAB. TIP. P. GIBELLI

1907

Al ĉiuj Italaj Esperantistoj
mi dediĉas tiun-ĉi tradukajon.

C. BICKNELL.

Bordighera, 1907.



ANTAŪPAROLO.

Thomas Babington Macaulay, verkisto kaj historiskribanto, unu el la plej gloraj Anglaj kleruloj en la lasta centjaro, naskiĝis en 1800.

Antaŭ ol li estis okjara, li verkis poezion kaj Resumon de Tutmonda Historio. Post tre honorplena universitata kurso, li baldaŭ komencis verki por revuoj, kaj liaj artikoloj tuj famigis lin. En 1826 li fariĝis advokato, kaj en 1830 parlamentano. En tiu tempo okazis gravaj malfeliĉoj al lia familio, kaj li estis tiel malriĉa ke li deviĝis vendi la oran medalon kiun li ricevis de la universitato. Sed en 1834 li estis elektita leĝkonsilanto al la Hindia registaro, kun salajro da dekmil funtoj sterlingaj. Post kvar jaroj en Hindujo li revenis hejmen kaj en 1839 estis denove elektita parlamentano. En 1842 li verkis la Baladojn pri Antikva Romo. En la ĝeneralaj elektoj de 1847 li ne estis reelektita, sed li komencis sian plej faman verkon, La Historio pri Anglujo. Tiu-ĉi libro estis tradukita en preskaŭ ĉiujn Eŭropajn lingvojn, kaj dum dudekkvin jaroj centkvar-dekmil Anglaj ekzempleroj estis venditaj. En 1857

la reĝino nobeligis lin, sed jam li ekmalsaniĝis kaj li mortis en 1859 antaŭ ol li finis la historion.

La rakonto pri Horacio troviĝas en la Historio pri la Roma Imperio de T. Livio, Lib. II, Cap. 10. La jena estas la tradukajo.

« Kiam la malamikoj alproksimiĝis, ĉiu kiu povis forlasis la kamparon kaj eniris la urbon. La urbon mem oni ĉirkaŭis per remparoj. Kelkaj lokoj en ĝi ŝajnis sendanĝeraj pro la muroj, kaj aliaj pro la kontraŭa Tibero. Nur la Ponto 'Sublicius' estis facila rimedo por eniro. Sed unu viro, Horacio Kokles, kiu okaze estis gardanto apud la ponto, ekvidis ke per subita atako Janikulumo estas jam kaptita, kaj ke la malamikoj rapidas malsupren; ankaŭ ke siaj timemaj kunurbanoj demetas la armilojn kaj forlasas la vicojn. Li riproĉis ilin individue, baris la vojon, kaj petegis je la nomoj de dioj kaj de homoj, ke ili ne forlasu la remparojn, ĉar ili nenion gajnos, kaj baldaŭ estos plimulte da malamikoj en la Kapitolina kaj Palatina Montetoj, ol en la Janikuluma. Li konsilis kaj petegis, ke ili detruu la ponton per hakiloj, fajro, aŭ ia ajn ebla rimedo. Li men tiel multe kiel eble unu korpo povos fari, kontraŭstaros al la atako. Li tiam iris al la alia rando de la ponto, kaj tie estis tre klare distingita inter la dorsoj de la malantaŭirantaj Romanoj. Li svingis siajn armilojn, kaj pro sia kuraĝo mirigis la malamikojn. Honora sento

tenis kun li du aliajn, Spurion Larcion kaj Titon Herminion, ambaŭ virojn tre konitajn pro iliaj deveno kai agoj. Kune kun tiuj-ĉi li kontraŭstaris al la unua danĝera kaj sovaĝa atako, kaj poste, ĉar nur restas iom da la ponto, kaj je la alvoko de tiuj kiuj estas dehakantaj ĝin, devigis siajn kunulojn sin savi. Tiam fiere rigardante la Etruskajn ĉefojn, ĉu per batalinvitoj al individuoj, ĉu per riproĉoj al ĉiuj, li ekkriis, "Ho! sklavoj de fieraj reĝoj, vi neniel ŝatas vian propran liberecon kai vi venas ataki tiun de aliaj". Dum kelka tempo ili ŝanceligis, ĉar ĉiu atendis ke alia komencu la batalon. Fine honto ekscitis la vicojn, kaj kriegante, ili de ĉiu flanko jetis la lancojn sur la solan malamikon. Sed kiam ĉiuj pikiloj estis haltigitaj per lia ŝildo, kaj li ĉiam obstine gardis la ponton per senmova piedforteco, ili pensis forpeli lin per rapida atakego. Sed en tiu momento la bruo de la rompiĝanta ponto, kaj la ĝojaj kriegoj de la Romanoj pro la finiĝo de la detrua laboro, subite timegigis kaj haltigis ilin. Tiam Kokles diris. "Ho! Patro Tibero, mi kore petas ke via favorema rivero akceptu tiun-ĉi soldaton kaj liajn armaĵojn". Kaj, tion dirinte, li, tute armita, ensaltis en la Tiberon kaj malgraŭ la granda nombro da lancoj kiuj falis sur lin, li save tranagis al la siaj, farinte agon kiu en la estonteco estos pli faminda ol kredinda. Pro tia heroismo la ŝtato ne estis sendankema. Oni metis


statuon en la Kunvenejo, haj donacis al li tiom da kamparo kiom estis ĉirkaŭplugita en la daŭro de unu tago.

« Krom la publikaj honoroj, la malavareco de privataj urbanoj estis tre rimarkinda, ĉar ĉiu, malgraŭ la malsufiĉo, laŭ siaj kondiĉoj, donacion, kiel eble plej multe, eĉ malmultigante por tiu celo siajn proprajn vivrimedojn. » ||

Kredeble tiu-ĉi rakonto estas nur unu el la multaj antikvaj poeziaj legendoj pri la deveno kaj progreso de la urbo, kiujn la popolo kantis aŭ deklamis, sed kiuj, iom post iom, penetris en la kronikojn, kaj fine estis akceptitaj kiel faktoj.

La versoj de Macaulay pli malpli imitas la stilon de la antikvaj Anglaj baladoj.





HORATIUS

A Lay made about the year of the City CCCLX

Lars Porsena of Clusium

By the Nine Gods he swore
That the great house of Tarquin
Should suffer wrong no more.
By the Nine Gods he swore it,
And named a trysting day,
And bade his messengers ride forth,
East and west and south and north.
To summon his array.

East and west and south and north
The messengers ride fast,
And tower and town and cottage
Have heard the trumpet's blast.
Shame on the false Etruscan
Who lingers in his home,
When Porsena of Clusium
Is on the march for Rome.

HORACIO

Balado verkita proksimume la tricentsesdekan jaron de la Urbo.

Jen ! Lars Porsen' de Klusiumo
Ekjuris je'l'naŭ Dioj,
Ke l'ras' Tarkvina ne silentos
Plu pri insulto-krioj ;
Je l'Dioj naŭ li juris, tiام
Li nomis tagon, lokon,
Kaj al la gent' de l'oriento,
De l'sud', de l'nord', de l'okcidento,
Li sendis la alvokon.

Senditoj tial ĉien rajdas,
Kaj urbo, tur', dometo,
En ĉiu lando baldaŭ aŭdas
La voĉon de l'trumpeto.
Fi do ! al Etruskano falsa
Restanta en la domo,
Ĉar Lars Porsen' de Klusiumo
Ekmaršas kontraŭ Romo.

The horsemen and the footmen
Are pouring in amain
From many a stately market-place;
From many a fruitful plain;
From many a lonely hamlet,
Which, hid by beech and pine,
Like an eagle's nest, hangs on the crest
Of purple Apennine;

From lordly Volaterrae,
Where scowls the far-famed hold
Piled by the hands of giants
For godlike kings of old;
From sea-girt Populonia,
Whose sentinels descry
Sardinia's snowy mountain-tops
Fringing the southern sky;

From the proud mart of Pisae,
Queen of the western waves,
Where ride Massilia's triremes
Heavy with fair-haired slaves;
From where sweet Clanis wanders
Through corn and vines and flowers;
From where Cortona lifts to heaven
Her diadem of towers.

Nun, piedirante aŭ rajdante,
Alvenas la vasaloj
Rapide, el majestaj urboj,
El fruktodonaj valoj ;
El vilagetoj izolitaj
Sub fagoj kaj sub pinoj.

Ŝajnantaj aglonestoj sur la
Purpuraj Apenninoj ;

El alta Volatero, kie,
Per grandegulaj manoj
La muroj iam konstruiĝis
Por diaj reĝtiranoj ;
El maroborda Populono,
Kie la gardistaro
La neĝajn Sardajn montopintojn
Ekvidas trans la maro ;

El la vendej' de Piso, glora
Reĝino de la maro,
En kies ŝipoj de Masiljo
Remadas la sklavaro ;
El kie Klano dolĉe fluas
Tra frukta regiono ;
El kie l'urb' Kortono brilas
Per alta turokrono.

Tall are the oaks whose acorns
Drop in dark Auser's rill ;
Fat are the stags that champ the boughs
Of the Ciminian hill ;
Beyond all streams Clitumnus
Is to the herdsman dear ;
Best of all pools the fowler loves
The great Volsinian mere.

But now no stroke of woodman
Is heard by Auser's rill ;
No hunter tracks the stag's green path
Up the Ciminian hill ;
Unwatched along Clitumnus
Grazes the milk-white steer ;
Unharmed the water fowl may dip
In the Volsinian mere.

The harvests of Arretium
This year, old men shall reap.
This year young boys in Umbro
Shall plunge the struggling sheep ;
And in the vats of Luna
This year, the must shall foam
Round the white feet of laughing girls
Whose sires have marched to Rome.

La glanoj de l'kverkegoj falas
Apud l'Aüsera fonto ;
La cervoj l'arbobranĉojn maĉas
De l'Ĉiminia monto ;
La riveretoj de Klitumno
Ĝojigas la paštistojn ;
La granda Volsinia lago
Gajigas la pafistojn.

Sed nun apud l'Aüsera fonto
Hakista bat' ne sonas ;
La verdajn vojojn de la cervo
Neniu ajn spionas ;
Apud Klitumno, nevidite
Sin paſtas la bovaro ;
Ĉe l'Volsiuia lag' sentime
Sin banas la birdaro.

Rikoltojn de Arretiumo
La maljunuloj havos ;
L'obstinajn ŝafojn en la Umbro
Nur junaj knaboj lavos ;
Nur ĉe l'šaŭmanta Luna mosto
Piedoij blankaj restos
De gajulinoj kies patroj
Al Rom' irintaj estos.

There be thirty chosen prophets,
The wisest in the land,
Who always by Lars Porsena
Both morn and eveniug stand ;
Evening and morn the Thirty
Have turned the verses o'er
Traced from the right on linen white
By mighty seers of yore.

And with one voice the Thirty
Have their glad answer given ;
“ Go forth, go forth, Lars Porsena,
Go forth, beloved of heaven ;
Go, and return in glory
To Clusium’s royal dome,
And hang round Nurscia’s altars
The golden shields of Rome ’.

And now hath every city
Sent up her tale of men ;
The foot are fourscore thousand,
The horse are thousand ten.
Before the gates of Sutrium
Is met the great array.
A proud man was Lars Porsena
Upon the trysting day.

Tridek profetoj elektitaj,
 Saĝuloj, en kunveno,
 La tutan tagon ĝis vespero
 Ceestas kun Porseno;
 Kaj ĉiam ili esploradas
 La sencon de l'versetoj
 Skribitaj sur la blanka tuko
 De noblaj praprofetoj.

Kaj unuvoĉe ili ĉiu
 Respondas per korbeno,
 “ Foriru, la ĉiel’ vin amas,
 Foriru, Lars Porseno;
 Foriru, kaj revenu glore,
 Al via reĝa domo,
 Por ke pendigu sur l’altaro
 La orsildar’ de Romo ”.

Alvenas do la militistoj,
 Ec okdek mil soldatoj,
 Infanteri’, kavalerio,
 El la Etruskaj ŝtatoj.
 En Sutrium’ unuiĝintaj
 Antaŭ la urbpordego;
 Fiera estis Lars Porseno
 Je l’ tag’ de l’kunvenego.

For all the Etruscan armies
Were ranged beneath his eye,
And many a banished Roman
And many a stout ally;
And with a mighty following
To join the muster came
The Tusculan Mamilius,
Prince of the Latian name.

But by the yellow Tiber
Was tumult and affright;
From all the spacious champaign
To Rome men took their flight.
A mile around the city
The throng stopped up the ways;
A fearful sight it was to see
Through two long nights and days.

For aged folks on crutches,
And women great with child,
And mothers sobbing over babes
That clung to them and smiled,
And sick men borne in litters
High on the necks of slaves,
And troops of sun-burned husbandmen
With reaping-hooks and staves,

Ĉar el la tuta land' ĉeestis
 Soldatoj ordigitaj ;
 Liganoj bravaj liaj, ankaŭ
 Romanoj ekzilitaj ;
 Kaj kun tre granda sekvantaro
 El l'urbo Tuskulumo
 Alvenis tien Mamilio
 La princ' de Latiumo.

Sed ĉe Tibero flava estis
 Tumulto kaj timego ;
 Al Rom' el la kampar' okazis
 La homa forkurego ;
 La vojoj estis plenigitaj
 El ĉiu najbarajo,
 Kaj dum du tutaj tagoj estis
 Terura la vidajo.

La maljunuloj, la lamuloj,
 Kun multe da virinoj
 Gravedaj, aŭ plorantaj kvankam
 Ridetas la idinoj ;
 La malsanuloj sur la ŝultroj
 De sklavaj la portistoj.
 Kaj, kun falciloj kaj bastonoj,
 Brunegaj laboristoj.

And droves of mules and asses.
Laden with skins of wine,
And endless flocks of goats and sheep,
And endless herds of kine,
And endless trains of wagons
That creaked beneath the weight ||
Of corn-sacks and of household goods,
Choked every roaring gate.

Now, from the rock Tarpeian,
Could the wan burghers spy
The line of blazing villages
Red in the midnight sky.
The Fathers of the City,
They sat all night and day,
For every hour some horseman came
With tidings of dismay.

To eastward and to westward
Have spread the Tuscan bands ;
Nor house, nor fence, nor dovecot
In Crustumerium stands.
Verbenna down to Ostia
Hath wasted all the plain ;
Astur hath stormed Janiculum,
And the stout guards are slain.

Je vinbareloj tre ŝarĝitaj,
 Azenoj kaj mularoj ;
 Senĉesaj aroj da bovinoj,
 Kun kaproj kaj ŝafaroj ;
 Kaj ĉaroj, unu post l'alia,
 Krakantaj sub pezego
 De mebloj kaj de grenosakoj,
 En ĉiu urbpordego.

Kaj nun de la Ŝtoneg' Tarpeja
 L'urbestroj rigardantaj
 La fajrojn vidis de vilaĝoj
 Je l'noktomez' brulantaj ;
 Ĉar de l'mateno ĝis la nokto
 La urbestrar' kunsidis,
 Al kiuj kun novaj' terura
 La rajdantar' rapidis.

L'armeo Tuska ĉiuflanken
 Tra la kamparo fluis,
 Kaj palisarojn, kolumbejojn,
 Kaj domojn ĝi detruis.
 Verbeno tutan l'ebenajon
 Ostian ruinigis ;
 Astur' Janikulumon kaptis
 Kaj virojn li mortigis.

I wis, in all the Senate,
There was no heart so bold,
But sore it ached, and fast it beat,
When that ill news was told.
Forthwith up rose the Consul,
Up rose the Fathers all ;
In haste they girded up their gowns,
And hied them to the wall.

They held a council standing
Before the River-Gate ;
Short time was there, ye well may guess,
For musing or debate.
Out spake the Consul roundly ;
“ The bridge must straight go down ;
For, since Janiculum is lost,
Nought else can save the town ”.

Just then a scout came flying,
All wild with haste and fear ;
“ To arms ! to arms ! Sir Consul ;
Lars Porsena is here ”.
On the low hills to westward
The Consul fixed his eye,
And saw the swarthy storm of dust
Rise fast along the sky.

Nu kiam la sciig' malbona
 Atingis la Senaton,
 La viroj la plej bravaj sentis
 Doloron kaj korbaton ;
 Starigis la Konsul', la estroj,
 El kie ili sidis,
 Kaj la mantelojn kunprenante,
 La muron tuj rapidis.

Okazis tie konsiliô
 Antaŭ la pard' rivera ; —
 — Por parolad' aŭ disputado
 Ne estis temp' libera —
 Ekkriis la Konsul' " Deňaku
 La ponton ; se ĝi restos,
 Pro la kaptita fortikajo
 La urb' perdata estos ".

Sendito tiam enkuregis,
 Pro timo tremegante,
 " Vin armu tuj, Sinjor' Konsulo,
 Jen Lurs Porsen' venante ".
 Al la montetoj okcidentaj
 Rigardis la Konsulo,
 Kaj vidis kiel en ĉielon
 Sin levas polvnebulo.

And nearer fast and nearer
Doth the red whirlwind come;
And louder still and still more loud
From underneath that rolling cloud,
Is heard the trumpet's war-note proud,
The trampling and the hum.
And plainly and more plainly
Now through the gloom appears,
Far to left and far to right,
In broken gleams of dark-blue light
The long array of helmets bright,
The long array of spears.

And plainly and more plainly
Above that glimmering line,
Now might ye see the banners
Of twelve fair cities shine;
But the banner of proud Clusium
Was highest of them all,
The terror of the Umbrian,
The terror of the Gaul.

And plainly and more plainly
Now might the burghers know,
By port and vest, by horse and crest,
Each warlike Lucumo.

Kaj pli rapide kaj proksimen
 Alvenis la ventego,
 Kaj ĉiam pli kaj pli bruanta
 Sub tiu nub' envolviganta
 Aŭdigis la trumpet' sonanta,
 L'armaea murnurego ;
 Kaj ĉiam pli kaj pli videble
 Tra la nebul' malhela,
 La vasta multo da legioj
 Kun brilaj kaskoj en linioj,
 Kaj lancoj kiel lumradioj
 De blukoloro bela.

Kaj ĉiam pli kaj pli videble
 Eĉ super tiuj kurboj,
 Brileatis klare la standardoj
 El dekdu belaj urboj.
 Sed la plej alta, la standardo
 De Klusium' vidiĝis,
 Pro kiu eĉ la Umbrianoj
 Kaj Gaŭloj ektremiĝis.

Kaj nun la ĉefaj princoj estis
 Pli klare rekonitaj ;
 Pro vest', ĉevalo, kask' aŭ kresko
 Precipe distingitaj ;

There Cilnius of Arretium
On his fleet roan was seen ;

And Astur of the fourfold shield,
Girt with the brand none else may wield,
Tolumnius with the belt of gold,
And dark Verbenna from the hold
By reedy Thrasymene.

Fast by the royal standard,
O'erlooking all the war,
Lars Porsena of Clusium
Sat in his ivory car.

By the right wheel rode Manilius,
Prince of the Latian name ;
And by the left false Sextus,
That wrought the deed of shame.

But when the face of Sextus
Was seen among the foes,
A yell that rent the firmament
From all the town arose.

On the house-tops was no woman
But spat towards him and hissed,
No child but screamed out curses,
And shook its little fist.

Ĉilnio el Arretiumo

Sur la ĉeval' vivplena ;
 Asturo kun la ŝild' kvarobla,
 Tro peza por vir' malpli nobla ;
 Kaj Tolumni' per or' zonita ;
 Kaj li, Verben', el fortigita
 Lagdomo Trasimena.

Kaj apud la standardo reĝa,
 En sia ĉar' sidante,
 Li, Lars Porsen' de Klusumo,
 L'armeon travidante.

El Latiumo Mamilio

La princo, dekstre staris ;
 Maldekstre falsa Seksto kin
 Hontindan agon faris.

Sed kiam la vizaĝ' de Seksto
 Aperis al Romanoj,
 Krieg' ĉielon supreniris
 El bušoj de l'urbanoj.

Virinoj sur tegmentoj staris
 Kraĉante kaj siblante,
 L'infanoj ankaŭ lin malbenis
 Pugnetojn eĉ skuante.

But the Consul's brow was sad,
And the Consul's speech was low,
And darkly looked he at the wall,
And darkly at the foe;
“ Their van will be upon us
Before the bridge goes down;
And if they once may win the bridge,
What hope to save the town? ”

Then out spake brave Horatius,
The Captain of the Gate;
“ To every man upon this earth
Death cometh soon or late.
And how can man die better
Than facing fearful odds,
For the ashes of his fathers,
And the temples of his Gods,

“ And for the tender mother
Who dandled him to rest,
And for the wife who nurses
His baby at her breast,
And for the holy maidens
Who feed the eternal flame,
To save them from false Sextus
That wrought the deed of shame?

Mallaŭte la Konsul' parolis
 Per voĉo de malĝojo ;
 La ponton li rigardis, ankaŭ
 L'armeon sui la vojo.
 " Se, antaŭ ol la pont' rompiĝos,
 Alvenos ĝia fronto,
 Esper' nenia restos savi
 La urbon, pro la ponto ''.

Subite Horacio brava,
 La pordgardisto, diras,
 " Pli malpli frue al la morto
 Estajo ĉia iras ;
 Ĉu vir' pli noble povas morti
 Ol sur la batalejoj
 Per la honoro de prapatroj
 Aŭ por la Dipreĝejoj ! "

" Kaj por patrino kara kiu
 Lin metis en lulilon,
 Kaj por l'edzino kiu nutris
 Sur sia brust' la filon ;
 Kaj por la sanktaj gardistinoj
 De la eterna flamo ;
 Ĉar ĝi de Seksto savas ilin, —
 — Li de malĉasta famo ''.

" Hew down the bridge, Sir Consul,
With all the speed ye may ;
I, with two more to help me,
Will hold the foe in play.
In yon strait path a thousand
May well be stopped by three ;
Now who will stand on either hand,
And keep the bridge with me ? "

Then out spake Spurius Lartius ;
A Ramnian proud was he ;
" Lo, I will stand at thy right hand,
And keep the bridge with thee ".
And out spake strong Herminius ;
Of Titian blood was he ;
" I will abide on thy left side,
And keep the bridge with thee ".

" Horatius, " quoth the Consul,
" As thou sayest, so let it be ".
And straight against that great array
Forth went the dauntless Three.
For Romans in Rome's quarrel
Spared neither land nor gold,
Nor son nor wife, nor limb nor life,
In the brave days of old.

“ Do kiel eble plej rapide
 Dehaku nun la ponton;
 Se nur aliaj du min helpos
 Haltigos ni la fronton.
 Mil virojn en mallarĝa vojo
 Tri povas bone bari;
 Do miaflanken venu kiu
 Kun mi nun volas starî ”.

Tiam la Ramnian' fiera
 Larcio, respondante,
 Ekkriis, “ Mi la ponton gardos
 Ĉe l'dekstra flank' starante ”.
 Respondis ankaŭ Herminio
 La Tician', dirante,
 “ Mi ĉe l'maldekstra flanko staros
 La ponton kungardante ”.

“ Farota estu ” la Konsulo
 Al Horacio diris,
 Kaj kontraŭ la armeo granda
 La tri bravuloj iris.
 Ĉar por la urbo ĉiuj donis
 Eĉ kun malavareco,
 Bienojn, filojn, membrojn, vivon,
 En glora estinteco.

Then none was for a party;
Then all were for the state;
Then the great man helped the poor,
And the poor man loved the great;
Then lands were fairly portioned,
Then spoils were fairly sold;
The Romans were like brothers
In the brave days of old.

Now Roman is to Roman
More hateful than a foe,
And the tribunes beard the high,
And the Fathers grind the low.
As we wax hot in faction,
In battle we wax cold;
Wherefore men fight not as they fought
In the brave days of old.

Now while the Three were tightening
Their harness on their backs,
The Consul was the foremost man
To take in hand an axe;
And Fathers mixed with Commons
Seized hatchet, bar, and crow.
And smote upon the planks above,
And loosed the props below.

Neniu estis partiano,
Sed ĉiuj por la ŝtato,
La mizerul' riĉulon amis,
Riĉulo ŝajnis frato ;
Terojn kaj akirajojn ĉiuj
Ricevis laŭ justeco,
Ĉar la Romanoj fratoj estis
En glora estinteco.

Sed nun Romanojn malamike
Malamas la Romanoj ;
Juĝistoj ŝtelas de l'nobeloj,
La estroj de l'urbanoj ;
Patriotismo malvarmiĝas
Pro manko je frateco ;
Neniu plu batalas kiel
En glora estinteco.

Jen dum la tri herooj estis
L'armajon alligantaj,
Hakilon prenis la Konsulo,
Kaj ĉiuj ĉeestantaj
Per pikelegoj kaj marteloj
La ponttabulojn hakis,
Ĝis tiuj supre ekrompiĝis
Kaj la subtenoj krakis.

Meanwhile the Tuscan army,
Right glorious to behold,
Came flashing back the noonday light,
Rank behind rank, like surges bright
Of a broad sea of gold.

Four hundred trumpets sounded
A peal of warlike glee,
As that great host, with measured tread,
And spears advanced, and ensigns spread,
Rolled slowly towards the bridge's head
Where stood the dauntless Three.

The Three stood calm and silent,
And looked upon the foes,
And a great shout of laughter
From all the vanguard rose;
And forth three chiefs came spurring
Before that deep array ;
To earth they sprang, their swords they drew,
And lifted high their shields, and flew
To win the narrow way.

Aunus from green Tifernum
Lord of the hill of vines ;
And Seius, whose eight hundred slaves
Sicken in Ilva's mines ;

Kaj dum'e la arme' Tuskana
 En la sunlum' rebrilis,
 Kaj la vidaj' de l'vicoj helaj
 Maršantaj, al la ondoj belaj
 De ora mar' similis.

Kvarcentoj da trumpetoj tiam
 Batalmuzikon faris,
 Kaj iris la arme', pašante,
 Flagojn kaj lancojn sublevante,
 Al ponto kie, atendante
 La tri bravuloj staris.

La malamikojn rigardante,
 La Tri' silente restis,
 Kaj el la fronto de l'armeo
 Ridego moka estis.
 Kaj tiam ĉefoj tri rapide
 Elrajdis el la fronto,
 Eksaltis teren, alte tenis
 La ŝildojn, la glavegojn prenis,
 Kaj kuris al la ponto.

Aŭno el verda Tifernumo
 La mont' de vinberejoj,
 Kaj Sejo kies okcent sklavoj
 Laciĝas en minejoj;

And Picus, long to Clusium
Vassal in peace and war,
Who led to fight his Umbrian powers
From that gray crag where, girt with towers,
The fortress of Nequinum lowers
O'er the pale waves of Nar.

Stout Lartius hurled down Aunus
Into the stream beneath ;
Herminius struck at Seius,
And clove him to the teeth ;
At Picus brave Horatius
Darted one fiery thrust ;
And the proud Umbrian's gilded arms
Clashed in the bloody dust.

Then Ocnus of Falerii
Rushed on the Roman Three ;
And Lausulus of Urgo,
The Rover of the sea ;
And Aruns of Volsinium,
Who slew the great wild boar,
The great wild boar that had his den
Amidst the reeds of Cosa's fen,
And wasted fields, and slaughtered men,
Along Albinia's shore.

Kaj Piko, dum milit' aŭ paco,
L'amik' de Klusiumo,
Kiu kun sia soldataro
Alvenis el la ŝtonremparo
Kaj turoj apnd l'akvo Naro,
La forta Nekvumo.

Larcio Aŭnon per batego
En la riveron sendis;
Kaj Herminio Sejon vundis
Kaj lian kapon fendis;
Kuraĝa Horacio Pikon
Nur unufoje pušis,
Kaj la fiera Umbriano
En sanga pulvo kušis.

Tiam aliaj tri ekkuris
Al la Romana trio;
Laŭsul' de Urgo, marrabisto,
Okno de Falerio,
Kaj el Volsinium', Arunso;
L'apregon li mortigis
Loĝintan en la Kosaj kanoj,
Ĉar grenon de la vilaganoj
Kaj eĉ la vivon de la anoj
Gi ofte ruinigis.

Herminius smote down Aruns;
Lartius laid Ocnus low;
Right to the heart of Lausulus
Horatius sent a blow.
“ Lie there ”, he cried, “ fell pirate !
No more, aghast and pale,
From Ostia’s walls the crowd shall mark
The track of thy destroying bark;
No more Campania’s hinds shall fly
To woods and caverns when they spy
Thy thrice accursed sail ”.

But now no sound of laughter
Was heard among the foes.
A wild and wrathful clamour
From all the vanguard rose
Six spears’ length from the entrance
Halted that deep array,
And for a space no man came forth
To win the narrow way.

But hark ! the cry is Astur ;
And lo ! the ranks divide ;
And the great Lord of Luna
Comes with his stately stride.
Upon his ample shoulders
Clangs loud the fourfold shield,
And in his hand he shakes the brand
Which none but he can wield.

Larcio Oknon tuj dejetis,
 Arunson Herminio ;
 La koron de Laŭsul' trapikis
 La glav' de Horacio.
 Kušiĝu, marrabist', " li kriis,
 " El la Osti-kasteloj
 Ne plu vidiĝos sur la maro
 La vojo de l'rabadšiparo ;
 Ne plu sin kašos la cervaroj
 En la kavernoj aŭ arbaroj
 Je l' vid' de viaj veloj ".

Sed nun inter la malamikoj
 Ridad' ne plu aŭdiĝis ;
 Brueg' kolera kaj sovaĝa
 De l' fronto komenciĝis.
 Je lancoj ses de la eniro
 La largaj vicoj haltis,
 Dum longa tempo vir' neniu
 El la arme' forsaltis.

Sed " Ho ! Asturo ! " oni krias ;
 La vicoj malfermiĝas ;
 Kaj el l'armeo la Sinjoro
 De Luno nun eliĝas.
 Sur liaj ŝultroj largaj pendis
 La granda ŝild' kvarobla,
 Kun glav' en mano kiu taŭgas
 Nur por bravulo nobla,

He smiled on those bold Romans
A smile serene and high ;
He eyed the flinching Tuscans,
And scorn was in his eye.

Quoth he, " The she-wolf's litter
Stand savagely at bay ;
But will ye dare to follow,
If Astur clears the way ? "

Then, whirling up his broadsword
With both hands to the height,
He rushed against Horatius
And smote with all his might.
With shield and blade Horatius
Right deftly turned the blow ;
The blow, though turned, came yet too nigh ;
It missed his helm but gashed his thigh ;
The Tuscans raised a joyful cry
To see the red blood flow.

He reeled, and on Herminius
He leaned one breathing-space ;
Then, like a wild cat mad with wounds,
Sprang right at Astur's face.
Through teeth, and skull, and helmet
So fierce a thrust he sped,
The good sword stood a hand-breadth out
Behind the Tuscan's head.

Li kun mieno tre trankvila
 Rigardis la Romanojn,
 Kaj per okul' malšatoplena
 Timemajn la Tuskanojn.
 Kaj kriis, " Lupinidoj staras
 Kontraŭe tre sovaĝe,
 Sed eble, se mi vin kondukos,
 Vi sekvos min kuraĝe".

Levinte tiam sian glavon
 Per manoj du altege,
 Li kontraŭ Horacio kuris
 Kaj batis lin fortege.
 Per ŝildo kaj glavego lerte
 Sin savis Horacio ;
 Ne estis lia kask' tuŝita,
 Sed el femuro vundegita
 La sango fluis, kaj subita
 Eksonis ĝoja krio.

Li ŝanceligis, sin klinante
 Sur Hermini', kaj haltis ;
 Kaj tiam, kiel kat' sovaĝa,
 Li sur Asturon saltis.
 Tra kask' kaj dentoj li pušegis
 La glavon kun pasio,
 Ĝis longe ĝia pint' transpikis
 Ec ekster la kranio.

And the great Lord of Luna
Fell at that deadly stroke
As falls on Mount Alvernus
A thunder-smitten oak.
Far o'er the crashing forest
The giant arms lie spread;
And the pale augurs muttering low,
Gaze on the blasted head.

On Astur's throat Horatius
Right firmly pressed his heel,
And thrice and four times tugged amain
Ere he wrenched out the steel.
" And see " he cried, " the welcome,
Fair guests, that waits you here !
What noble Lucumo comes next
To taste our Roman cheer ? "

But at his haughty challenge
A sullen murmur ran,
Mingled of wrath, and shame, and dread,
Along that glittering van.
There lacked not men of prowess,
Nor men of lordly race;
For all Etruria's noblest
Were round the fatal place.

Kaj talis la Sinjor' de Luno
 Subite mortigita,
 Simile al Alverna kverko
 Per fulmo trafendita.
 La branĉoj de la grandegulo
 L'arbaran teron tegas,
 Kaj la profetoj ĝian pinton
 Rigardas, kaj timegas.

Kaj Horaci' kalkanon sian
 Sur lia gorĝo tenis,
 Kaj multe foje la glavegon
 El ĝi eltiri penis.
 " Ho ! karaj gastoj ", li ekkriis,
 " Rimarku la bonvenon !
 Noblulo kiu nun alvenos
 Gastumi la festenon ! "

Kaj tiam ĉe la front' brilanta,
 Pro la invit' fiera,
 Murmur' mallaŭta ekaŭdiĝis,
 Timema kaj kolera.
 Ne mankis noble naskiĝintoj
 Nek viroj braveguloj.
 Ĉar tien estis kunvenintaj
 L'Etruskaj nobeluloj.

But all Etruria's noblest
Felt their hearts sink to see
On the earth the bloody corpses,
In the path the dauntless Three;
And, from the ghastly entrance
Where those bold Romans stood,
All shrank, like boys who unaware,
Ranging the woods to start a hare,
Come to the mouth of the dark lair
Where, growling low, a fierce old bear
Lies amidst bones and blood.

Was none who would be foremost
To lead such dire attack;
But those behind cried " Forward! "
And those before cried " Back! "
And backward now and forward
Wavers the deep array;
And on the tossing sea of steel,
To and fro the standards reel;
And the victorious trumpet-peal
Dies fitfully away.

Yet one man for one moment
Stood out before the crowd;
Well known was he to all the Three,
And they gave him greeting loud;
" Now welcome, welcome, Sextus!
Now welcome to thy home!
Why dost thou stay, and turn away?
Here lies the road to Rome".

Sed al la koroj la plej noblaj
 Mankis la energio,
 Pro la mortintoj sur la tero,
 Kaj la sentima Trio.
 Kuraĝis eĉ neniu iri
 Al tiu pontorando ;
 Kiel junuloj, kiuj volas
 Leporon ĉasi, sed nur trovas
 En la arbaro ursoneston
 Kaj tie la sovaĝan beston
 Kun sang' kaj ostviando.

Por la komenco de l'atako
 Oferis sin neniu ;
 " Antaŭen iru ", iu kriis,
 Kaj " Malantaŭen " iu ;
 Antaŭen do kaj malantaŭen
 La viroj ŝanceligis ;
 La flagoj vane por batalo
 Svingigis sur la mova stalo,
 Kaj voĉoj de l' trumpet-signalو
 Baldaŭ eksilentigis.

Sed unu viro el l'amaso
 Eliris nur minuton,
 Kaj rekoninte lin, la Trio
 Ekkriis " Ho ! saluton !
 Bonvenu, Seksto, kaj bonvenu,
 Jen estas via domo ;
 Kial vi restas kaj prokrastas ?
 Jen la vojet' al Romo ".

Thrice looked he at the city;
Thrice looked he at the dead;
And thrice came on in fury,
And thrice turned back in dread;
And, white with fear and hatred,
Scowled at the narrow way
Where, wallowing in a pool of blood,
The bravest Tuscans lay.

But meanwhile axe and lever
Have manfully been plied;
And now the bridge hangs tottering
Above the boiling tide.

“Come back, come back, Horatius!”
Loud cried the Fathers all;
Back, Lartius! back, Herminius!
Back, ere the ruin fall!”

Back darted Spurius Lartius;
Herminius darted back;
And, as they passed, beneath their feet
They felt the timbers crack.
But when they turned their faces,
And on the farther shore
Saw brave Horatius stand alone,
They would have crossed once more.

Trifoje li la mortigintojn,
Trifoje l' urbon vidis;
Trifoje furioze kuris,
Trifoje rerapidis;
Kaj per timego blankiĝinte
Blasfemis, pro l'vojeto
En kiu la bravuloj Tuskaj
Kuſis en sang-lageto.

Nun per hakiloj kaj leviloj
La ponton oni fendis,
Ĝis sur la akvoj ŝaŭmegantaj
Ĝi rompiĝonte pendis.
Urbestraj voĉoj laŭte kriis
“ Revenu, Horacio,
La ponto estas rompiĝanta,
Revenu, brava Trio ”.

Larcio malantaŭen saltis
Kaj Hermini', kurantaj;
La traboj de la ponto krakis
Sub ili surpaſtantaj;
Sed kiam ili rerigardis
Kaj Horacion vidis
Lasitan trans la bordo, ili
Reiri tuj decidis.

But with a crash like thunder
Fell every loosened beam,
And, like a dam, the mighty wreck
Lay right athwart the stream;
And a long shout of triumph
Rose from the walls of Rome,
As to the highest turret-tops
Was splashed the yellow foam.

And, like a horse unbroken
When first he feels the rein,
The furious river struggled hard,
And tossed his tawny mane.
And burst the curb, and bounded,
Rejoicing to be free,
And whirling down, in fierce career,
Battlement, and plank, and pier,
Rushed headlong to the sea.

Alone stood brave Horatius,
But constant still in mind ;
Thrice thirty thousand foes before,
And the broad flood behind.
“ Down with him ! ” cried false Sextus,
With a smile on his pale face ;
“ Now yield thee ”, cried Lars Porsena,
Now yield thee to our grace ”.

Sed kun bruego tondra falis
La traboj malligitaj,
Kaj la ruinoj tute estis
Tra l'akvo disjetitaj.

Kriego triumfega tiام
Eksonis el la muroj,
Kiam la flava ŝaŭmo spruĉis
Ĝis la plej altaj turoj.

Kiel ĉeval' l'unuan fojon
La bridon eksentante,
Tiel baraktis la rivero
En ŝaumon sin skuante ;
Kaj saltis, sin liberigante,
Kaj rompis ĉian baron,
Portante sur la flusupraĵoj
Subtenojn, trabojn kun murajoj,
Kaj kuris en la maron.

Nun sola staris Horacio
Sentima kaj konstanta ;
Antaŭ, la naŭdekmil soldatoj ;
Ĉe li, l'akveg' saŭmanta ;
“ Dejetu lin ”, ekkriis Seksto,
Kun rid' el falsa koro ;
Porseno diris, “ Al ni cedu
Kaj petu por favoro ”.

Round turned he, as not deigning
Those craven ranks to see;
Nought spake he to Lars Porsena,
To Sextus nought spake he;
But he saw on Palatinus
The white porch of his home;
And he spake to the noble river
That rolls by the towers of Rome.

“ O Tiber! father Tiber!
To whom the Romans pray,
A Roman’s life, a Roman’s arms,
Take thou in charge this day! ”
So he spake, and speaking sheathed
The good sword by his side,
And with his harness on his back,
Plunged headlong in the tide.

No sound of joy or sorrow
Was heard from either bank;
But friends and foes in dumb surprise,
With parted lips and straining eyes,
Stood gazing where he sank;
And when above the surges
They saw his crest appear,
All Rome sent forth a rapturous cry,
And even the ranks of Tuscany
Could scarce forbear to cheer.

Li turnis sin, ĉar la timulojn
 Li ne ekvidi volis,
 Kaj al Porseno kaj al Seksto
 Nenion li parolis;
 Sed sur Mont' Palatin' li vidis
 La sian blankan domon,
 Kaj preĝis al river' la nobla
 Bananta belan Romon.

“ Ho! patro vi! Tiber', al kiu
 Preĝadas la Romanoj,
 Armilojn, vivon miajn gardu
 Hodiaŭ viaj manoj ”.
 Li diris; tiam eningigis
 Je l' flanko la glavegon,
 Kaj kun l'armajoj tute saltis
 Subite en l'akvegon.

Nek ĝoja nek malĝoja krio
 Aŭdiĝis de la tero,
 Sed ĉiuj en silent', timante,
 Senmovaj staris, atendante,
 Pio lia malapero;
 Sed kiam sur la akvosupro
 La lia kap' revenis,
 Aplaŭdis laŭte la Romanoj,
 Kaj, je la ĝojo, la Tuskanoj
 Mem preskaŭ partoprenis.

But fiercely ran the current,
 Swollen high by months of rain;
And fast his blood was flowing,
 And he was sore in pain,
And heavy with his armour,
 And spent with changing blows;
And oft they thought him sinking,
 But still again he rose.

Never, I ween, did swimmer,
 In such an evil case,
Struggle through such a raging flood
 Safe to the landing place;
But his limbs were borne up bravely
 By the brave heart within,
And our good father Tiber
 Bore bravely up his chin.

“ Curse on him ! ” quoth false Sextus ;
 “ Will not the villain drown ?
But for this stay, ere close of day
 We should have sacked the town ! ”
“ Heaven help him ” quoth Lars Porsena,
 “ And bring him safe to shore ;
For such a gallant feat of arms
 Was never seen before ”

Sed la torrent' fiere kuris,
 Pro daŭro da pluvego,
 Kaj lia sango forfluadis
 Kun grava dolorego;
 Kaj pro l' armajoj, kaj pro l' batoj
 Kiujn li jam ricevis,
 Li ofte subakviĝe iris
 Sed ĉiam sin relevis.

Neniam al naĝant' okazis,
 Kiun fatal' malbenis,
 Ke post torrent-barakto tia
 Li teren realvenis.
 Sed lia bravá koro helpis
 La korpon per kuraĝo,
 Kaj sur Tibero, patro nia,
 Leviĝis la vizaĝo.

“ Li malbenita estu ” Seksto
 Ekkriis, “ Li ne dronas ;
 Sen li ni estus nun en l'urbo,
 Rabadon ni bezonas ”.
 “ Lin helpu la ĉiel', lin savu ”
 Nur Lars Porseno kriis,
 Ĉar tian heroajan agon
 Neniam oni sciis ”

And now he feels the bottom ;
Now on dry earth he stands ;
Now round him throng the Fathers
To press his gory hands ;
And now with shouts and clapping,
And noise of weeping loud,
He enters through the River-Gate,
Borne by the joyous crowd.

They gave him of the corn-land,
That was of public right,
As much as two strong oxen
Could plough from morn till night ;
And they made a molten image,
And set it up on high,
And there it stands unto this day
To witness if I lie.

It stands in the Comitium,
Plain for all folk to see ;
Horatius in his harness,
Halting upon one knee ;
And underneath is written,
In letters all of gold,
How valiantly he kept the bridge
In the brave days of old.

Kaj nun la fundon li ekpalpas,
 Kaj nun sur tero kuſas,
 Kaj apud li la Patroj staras,
 La sangajn manojn tuſas ;
 Kaj nun kun krioj kaj aplaŭdoj
 Kaj ploro tre kompata,
 Li tra l' rivero-pordo iras
 De la popol' portata,

Kaj al li estis donacita
 El la publik-bieno,
 Kampar', de bovoj du plugita
 Dum unu tag', da greno ;
 Kaj oni metis bronz-statuon
 En l'urbo, kiu restas
 Hodiaŭ tie, kaj pro mia
 Rakonto nun atestas.

Ĝi en la kuniynejo estas,
 La bela figurajo
 De Horacio surgenue
 Vestita je armajo ;
 Kaj sube estas gravurita
 Per enskribajo ora,
 Ke li la ponton brave gardis
 En l'estinteco glora.

And still his name sounds stirring
Unto the men of Rome,
As the trumpet-blast that cries to them
To charge the Volscian home;
And wives still pray to Juno
For boys with hearts as bold
As his who kept the bridge so well
In the brave days of old.

And in the nights of winter,
When the cold north winds blow,
And the long howling of the wolves
Is heard amidst the snow;
When round the lonely cottage
Roars loud the tempest's din,
And the good logs of Algidus
Roar louder yet within;

When the oldest cask is opened,
And the largest lamp is lit;
When the chestnuts glow in the embers,
And the kid turns on the spit;
When young and old in circle
Around the firebrands close;
When the girls are weaving baskets,
And the lads are shaping bows;

Ĝis nun la korojn de l' Romanoj
La lia nom' ekscitas,
Kiel trumpeteto-voĉo kiu
Al la batal' invitas ;
Kaj al Junon' patrinoj preĝas
Ke filoj, laŭ braveco,
Similu al la pontgardinto
Je l' glora estinteco.

Kaj en malvarmaj vintraj noktoj
Pro la venteg' blovanta,
Kiam sonadas tra la neĝo
La kri' de lup' blekanta ;
Kaj kiam ekster kampdometoj
Aŭdiĝas la ventegoj
Dum en la domfajrejo brulas
Pli laŭte la ŝtipegoj ;

Kiam barel' vinplena estas
Kun lampoj alportitaj,
Kaj kaprideto kun kaštanoj
Antaŭ la fajr' rostitaj ;
Kiam ĉe l' famili-kunveno
Knabinoj korbojn faras,
Kaj apnd la fajrej' junuloj
Pafarkojn reriparas ;

When the goodman mends his armour,
And trims his helmet's plume;
When the goodwife's shuttle merrily
Goes flashing through the loom;
With weeping and with laughter
Still is the story told
How well Horatius kept the bridge
In the brave days of old.



Kiam armajojn l'edzo flikas,
Aü kaskoplumojn ligas ;
Kiam l' edzino la bobenon
Tra la teksil' flugigas ;
Aüdiĝas la rakonto vera,
Kun ploro kaj gajeco,
Pri Horaci', la pontgardinto
Je l' glora estinteco.






N O M A R O



- ALVERNO, monto apud Arretiumo, nun Alvernia.
- ARRETIUMO, urbo Etruska, nun Arezzo.
- ARUNSO, filo de Porseno.
- ASTURO, la regnistro de Luno.
- AÜSERO, Etruska rivero, nun Serchio.
- ÇILNIO, noblulo de Arretiumo.
- ÇIMINIA, nomo de montaro, foje la centro de la Etruska konfederacio kontraü Romo.
- ETRUSKANO, ano de Etrurio, nun Toscana.
- FALERIO, Etruska urbo, nun Faleria.
- JANIKULUMO, unu el la sep Romaj montetoj, trans la Tiberon, kie estis fortikajo. La ponto Sublicius kunigis ĝin kun la urbo. Sur ĝi Porseno lokis sian tendaron.
- KLANO, rivero Etruska, fluanta en la Tiberon, nun nomita Clania.
- KLITUMNO, rivero en Kampanio, nun Clitunno.
- KLUSIUMO, Etruska urbo, en kiu Porsena estis entombigita, nun Chiusi.
- KORTONO, Etruska urbo apud la norda flanko de la lago Trasimeno, nun Cortona.



- LATIUMO, parto de Italujo apud la rivero Tibero.
- LUNO, marborda Etruska urbo, fama pro ĝia marmoro. kaj proksime al la nuna Carrara.
- MAMILIO, bofilo de Tarkvino.
- MASILJO, nun Marseille, urbo fondita de Grekaj kolonianoj.
- NARO, rivero en Umbrio.
- NEKVIUMO, urbo en Umbrio, nun Terni.
- OSTIO, urbo sur la marbordo apud la influejo de la Tibero, nun Ostia.
- PALATINO, la plej granda el la sep Romaj montetoj, sur kiu oni ekkonstruis la urbon.
- PIKO, reĝo de Latiumo.
- PISO, Etruska urbo, nun Pisa.
- POPULONO, Etruska urbo kies ruinoj nun vidiĝas apud Piombino.
- PORSENO, Reĝo de Etrurio, kiu ekmilitis kontraŭ la Romanoj, ĉar ili ekzilis Tarkvinon kai lian familion.
- RAMNIANA, la nomo de unu de la enlandulaj gentoj kiuj Romo fondiĝis.
- SEKSTO, filo de Tarkvino la Fiera, kiu estis la sepa kaj lasta reĝo de antikva Romo. Li malvirgigis Lukrecion, noblan Roman virinon. Pro tiu ago la tuta Tarkvina gento estis forpelita kaj ekzilita.
- SUTRIUMO, Etruska urbo, nun Sutri.
- TARKVINO, la kvina reĝo de Romo, kaj ĉefo de la Tarkvina gento.
- TARPEJA, la Tarpeja Ŝonego estis la krutegajo sur la Kapitolina monteto en Romo. De ĝia supro oni kutimis dejeti la perfidulojn.
- TIBERO, la rivero de Romo, nun Tevere.

TICIANA, nomo de unu el la enlandulaj gentoj kiam Romo fondigis.

TIFERNO, antikva urbo sur samnoma rivcro nun nomita Biferno.

TOLUMNIO, Reĝo de Vejo, Etruska urbo, kies ruinojn oni nun vidas apud Isola Farnese,

TRASIMENO, Etruska lago.

TUSKA, Etruska.

TUSKULUMO, urbo de Latiumo ne malproksime de Romo.

UMBRO, Etruska rivero, nun Ombrone.

VERBENO, Etruska princo.

VOLATERO, Etruska urbo nun Volterra.

VOLSINIUMO, urbo Etruska kun lago, nun Bolsena.

